

Unesko kaj Esperanto

François Lo Jacomo

Lanĉita en **1887**¹ de pola okulisto Ludwik Lejzer Zamenhof, Esperanto rapide progresis, kun la organizo en 1905 de ĝia unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marco (Francio). UEA (Universala Esperanto-Asocio), fondita en 1908, rapide enhavis milojn da membroj kaj centojn da delegitoj. Ekde la fondiĝo de la Ligo de Nacioj en 1919, dekduo da landoj (reprezentantaj la duonon de la monda loĝantaro)² rekomendis la instruadon de Esperanto; Vic-Ĝenerala Sekretario Inazô Nitobe verkis favoran raporton en 1921, sed precipe Francio kontraŭis ĝin.

En 1949, UEA transdonis, nome de 500 organizaĵoj kaj 900.000 individuoj el 76 landoj, peticion al Unuiĝintaj Nacioj, por ke ĝi disvolvu Esperanton kaj instigu ĝian instruadon. Sed en **1954**, la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo (Urugvajo) unue malakceptis ĉi tiun rezolucion, antaŭ ol akcepti, danke al la insistado de Ivo Lapenna (jugoslava kaj poste brita juristo) kaj pro subteno de la loka loĝantaro, iomete malsaman rezolucion:

¹ Dato de eldono de la unua manlibro en pluraj lingvoj: *Lingvo Internacia de D-ro Esperanto*.

² Interalie Ĉinio ĉiam estis unu el la landoj subtenantaj Esperanton. La kreinto de la latinlitera skribmaniero de la ĉina lingvo *pinjino*, Zhou Youguang (1906 - 2017), estis esperantisto.

**Rezolucio aprobita la 10-an de decembro 1954
en la dekoka plenkunsido.**

IV.1.4.422 - La Ĝenerala Konferenco,

Post diskuto pri la raporto de la Ĝenerala Direktoro pri la internacia peticio favore al Esperanto (8C / PRG / 3),

IV.1.4.4221 - Notas la rezultojn akiritajn per Esperanto en internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la alproksimiĝo de popoloj;

IV.1.4.4222 - Konstatas, ke ĉi tiuj rezultoj konformas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV.1.4.4223 - Notas, ke pluraj Membro-Ŝtatoj sin deklaris pretaj enkonduki aŭ disvolvi la instruadon de Esperanto en siaj elementaj, meznivelaj aŭ superaj lernejoj, kaj invitas ĉi tiujn Membrojn informi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj akiritaj en ĉi tiu kampo;

IV.1.4.4224 - Rajtigas la Ĝeneralan Direktoron sekvi spertojn pri la uzo de Esperanto por edukado, scienco kaj kulturo, kaj kunlabori por ĉi tiu celo kun Universala Esperanto-Asocio en la kampoj, kiuj interesas ambaŭ organizaĵojn.

Dum ĉi tiu Ĝenerala Konferenco (1954), UEA estis akceptita en konsultaj rilatoj kun Unesko (kaj iom poste kun Unuiĝintaj Nacioj – Ekosok). Tiuj ĉi rilatoj konkretiĝis unue per aktiva diskonigo kaj kontribuo de UEA en programoj kaj eventoj de Unesko (Internacia Jaro de Edukado 1970, 25a jubileo de Unesko 1971, Internacia Libro-Jaro 1972, Jardeko de aktiveco por kontraŭbatali rasismon kaj rasan diskriminacion, Internacia Jaro de la Virino 1975...), per rekomendo de Unesko soleni Zamenhof kiel unu el la grandaj personecoj de la homaro, okaze de la centa jubileo de lia naskiĝo (1959), per eldono en Serio Oriento-Okcidento de plurdek tradukoj de gravaj kulturaj verkoj el la tuta mondo, ktp...

En la 1970-aj jaroj, la instruado de Esperanto en lernejoj disvolviĝis vaste sub la impeto, precipe, de la hungara filologo István Szerdahelyi. En 1977, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) prezidata de Helmut Sonnabend ekhavis rilatojn kun Unesko, en kategorio C (UEA estis en kategorio B).

En la sama jaro, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, **Amadou Mahtar M'Bow** vizitis Rejkjavikon (Islando), laŭ invito de UEA, por alparoli³ la Universalan Kongreson de Esperanto. La raporto MacBride (1980) altiris la atenton pri la problemo de komunikado, sed la Internacia Jaro pri Komunikado (1983) ne sufiĉe priatentis la lingvajn aspektojn.

Dum ni alproksimiĝis al la centjariĝo de Esperanto (1987), pluraj eventoj estas menciindaj:

En 1985, laŭ iniciato de la ĵurnalisto kaj mond-esplorinto Tibor Sekelj (jugoslava mondcivitano hungardevena), Unesko aprobis **duan rezolucion** favoran al Esperanto:

***Rezolucio aprobita la 8-an de novembro 1985,
en la tridek-sesa plenkunsido.***

Ĝenerala Konferenco de Unesko. 23^a sesio. Sofio (Bulgario).

11.11 - Festo de la centjariĝo de la kreiĝo de Esperanto.

La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante, ke en ĝia sesio de 1954 okazinta en Montevideo ĝi per sia rezolucio IV.1.4.422-4224 rimarkis la rezultojn akiritajn pere de ĉi tiu internacia lingvo Esperanto, koncerne intelektajn interŝanĝojn internaciajn kaj reciproka kompreno inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke ili konformas al la celoj kaj idealoj de Unesko,

³ Vidu la plenan tekston de lia parolado en la aldono.

Memorante, ke Esperanto ekde tiam faris grandajn paŝojn kiel instrumento de reciproka kompreno inter popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, enirinte plej multajn regionojn de la mondo kaj plej multajn homajn agadojn,

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto ofertas por internacia kompreno kaj komunikado inter popoloj de diversaj naciecoj,

Rimarkante la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigo de informoj pri la agadoj de Unesko, kaj ankaŭ ĝian partoprenon en ĉi tiuj agadoj,

Konsiderante, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la kreado de Esperanto,

- 1. Gratulas la Esperanto-movadon okaze de ĝia 100-jariĝo;*
- 2. Petas la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi proksime la disvolviĝon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi interkompreniĝon inter diversaj nacioj kaj kulturoj;*
- 3. Invitas la Membro-Ŝtatojn marki la centjariĝon de Esperanto per taŭgaj aranĝoj, deklaroj, specialaj aferoj kiel poŝtmarkoj kaj aliaj, kaj antaŭenigi la enkondukon de instruplano pri la problemo de lingvoj kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj superaj edukaj institucioj;*
- 4. Rekomendas, ke internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝu al la festo de la centjariĝo de Esperanto kaj studu la eblecon uzi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive pri Unesko-agadoj.*

De la 25-a ĝis la 27-a de **novembro 1985**, Unesko financis **tri-tagan konferencon** en sia sidejo (salono VI) pri *Plurlingveco kaj komunikado*, organizitan de Universala Esperanto-Asocio, kies raporto estis eldonita 500-ekzemplere (inkluzive 25 por Unesko).

Dum ceremonio inaŭguranta la centjariĝon de Esperanto la 16an de decembro 1986, la Premion Zamenhof ricevis Amadou Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de Unesko⁴.

En la 1990-aj jaroj Unesko redifinis siajn partnerajn kriteriojn kaj multaj neregistaraj organizaĵoj estis forigitaj el la listoj, ĉu ĉar ili ne kunlaboris sufiĉe kun Unesko, aŭ ĉar ilia agado ne estis sufiĉe internacia, precipe apenaŭ ĉeestanta en Afriko. Universala Esperanto-Asocio savis sian partnerecon, sed Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) perdis la sian. Tamen ĝi ne ĉesis esti regule invitata al Ĝeneralaj Konferencoj kaj aliaj Unesko-eventoj, en kiuj ĝi regule ĉeestas.

Afriko delonge estis malfortaĵo de la Esperanto-movado, kvankam Tibor Sekelj, en la 1980-aj jaroj, jam pledis okazigi tie Universalan Kongreson. Tamen dum iom pli ol dek jaroj Esperanto multe kreskis en Afriko, danke precipe al Mireille Grosjean (kiu longe prezidis ILEI). En 2008 okazis Internacia Konferenco de Esperanto-Instruistoj en Benino, kaj en 2017 Internacia Junulara Kongreso en Togolando.

TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la junulara sekcio de UEA, akiris sian memstarecon en 2017 por faciligi siajn proprajn partnerecojn. Ankaŭ ĝi (kiel ILEI) petas (re)fariĝi partnero de Unesko. Ĝi iĝis partnero de UN (Ekosok) en 2021.

En 2000, UEA grandparte kontribuis en la subskribo de la "Manifesto 2000 por kulturo de paco kaj neperforto".

En 2008, Internacia jaro de lingvoj, esperantistoj helpis traduki la inaŭguran mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Koïchiro Matsuura, al multaj lingvoj.

La 15-an de decembro 2008, alproksimiĝante al la 150-a datreveno⁵ de la naskiĝo de Ludwik Lejzer Zamenhof, UEA organizis, kun la delegacioj de Pollando kaj Litovio, konferencon en la sidejo de Unesko (salono II) titolitan: "Esperanto, justa lingvo".

⁴ Vidu la plenan tekston de lia parolado en la aldono.

⁵ La 150-a datreveno estis la sekva jaro, la 15-an de decembro 2009, sed dum la jaro 2009 estis organizitaj diversaj eventoj okaze de ĉi tiu datreveno.

Unesko kunmemoris la 100-an datrevenon, en **2017**, de la forpaso de Ludwik Lejzer Zamenhof, gastigante en sia sidejo (salono II), la 11an de decembro 2017, laŭ peto de Pollando, **simpozion** titolitan: "Tutmondiĝo, interreto, Unesko-Kuriero: kiel statas Esperanto cent jarojn post la morto de Zamenhof?". La raporto de ĉi tiu konferenco baldaŭ aperos.

La eldono en Esperanto de **Unesko-Kuriero** ekde 2017, produktita de Trezoro Huang Yinbao, estas ĉefa evento por la Esperanto-movado. Ekde 2020 ĝin prizorgas *El Popola Ĉinio*. UEA ankaŭ kuneldonis kun Unesko tradukon en Esperanton kaj en la ĉinan de la verko: *De ideoj al agoj, 70 jaroj de Unesko*. Krome, en sia serio Oriento–Okcidento, UEA jam eldonis en Esperanto 56 ĉefverkojn el multaj kulturoj de la mondo.

Hodiaŭ UEA kunlaboras aktive kun Unesko per paroladoj⁶ ĉe Ĝeneralaj Konferencoj, kaj per partopreno en organizado de forumoj (forumo 2020 pri tutmonda civitaneco) kaj ĉefe de festivaloj por paco. Inter tiuj ĉi festivaloj, organizitaj de grupo de NROj laŭ komisio de la Lig-Komitato de NROj ĉe Unesko, tiu planita por 2020 okazos finfine, pro la pandemio, la 17an de septembro 2022 en Toloso (Eŭskio): Esperanto estis unu el la kvar laborlingvoj, granda kvanto el la partoprenantaj korusoj aliĝis danke al la agado de esperantistoj, kaj unu el la ses surloke invitataj korusoj estos internacia koruso kantanta en Esperanto.

UEA kunlaboras pli ĝenerale kun Unuiĝintaj Nacioj, kaj estis elektita en 2018 membro de la Estraro de CoNGO (Konferenco de NROj en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj), kie ĝi estas reprezentata de Humphrey Tonkin. La 18an de majo 2022, oni starigis en Novjorko, sub aŭspicio de CoNGO, Komitaton de NROj pri Lingvoj, prezidata kaj vicprezidata de Francis M. Hult kaj Humphrey Tonkin, reprezentantoj de UEA ĉe UN. La temoj de niaj Universalaj Kongresoj estas elektitaj konforme al la temoj de la Internaciaj jaroj aŭ jardekoj de UN aŭ Unesko: nia venonta UK (Montrealo, Kanado, 6-13 aŭgusto 2022) havos kiel temon "Lingvo, vivo, tero: jardeko de indiĝenaj lingvoj".

⁶ Vidu la tekstojn de la paroladoj de 2017, 2019 kaj 2021 en la aldono.

Festado de la 70-a datreveno de la Mondcivitanoj, organizita de la asocio Pangeo NRO (fondita kaj prezidata de Nathalie Kesler), okazis interalie ĉe Unesko (20 novembro 2018) sub la patronado de Unesko, kaj Esperanto estis bone reprezentata. La Raporto aperis kiel duvoluma franclingva verko, entute 900-paĝa. Pangeo ONG iĝis partnero de UN (Ekosok) en 2021.

UEA klopodas, ke Unesko agnosku Esperanton nemateria kultura heredaĵo de la homaro. Ĝi jam troviĝas sur tia nacia listo de Pollando ekde 2014 kaj de Kroatio ekde 2019. Alia klopodo estas, ke la 26^a de julio estu agnoskita monda tago de Esperanto, pro la apero de la unua libro en tiu ĉi tago de 1887, same kiel en 2021 Unesko agnoskis la 7an de julio monda tago de la svahila lingvo.

ALDONO

Parolado de Amadou Mahtar M'Bow – Rejkjaviko, 31 julio 1977

Parolado de Amadou Mahtar M'Bow – Parizo, 16 decembro 1986

Mesaĝo de Audrey Azoulay – 29 julio 2018

Interveno de Rakoen Maertens – Parizo, 6 novembro 2017

Interveno de François Lo Jacomo – Parizo, 16 novembro 2019

Interveno de François Lo Jacomo – Parizo, 13 novembro 2021

**Parolado de Amadou-Mahtar M'Bow,
Ĝenerala Direktoro de Unesko,
al la Universala Kongreso de Esperanto
(Rejkjaviko, Islando, 31 julio 1977)**

Sinjoro prezidanto,
Sinjoroj Delegitoj
Sinjorinoj, sinjoroj,

Estas por mi plezuro profiti la okazon de mia oficiala vizito en Islando por alparoli vin ĉe la malfermo de la 62-a sesio de la Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. Tiurilate mi kore dankas la Prezidanton de la Asocio, S-ro Tonkin, pro lia afabla invito.

Vi elektis, Sinjoroj, loki vian Kongreson sub la temo de "rajto je komunikado"; ĝi estas temo, kiu interesas Uneskon pro pli ol unu kialo, ĉar komuniki estas jam kompreni. Unu el la esencaj taskoj de Unesko, laŭ ĝia Konstitucio, estas fortigo de monda paco, interkompreno inter popoloj kaj kunlaboro inter nacioj. Esperanto historie enradikiĝis en la sama principo.

D-ro Zamenhof, la entuziasma elpensinto de ĉi tiu lingvo, profunde maltrankviliĝis en sia junaĝo pro la fortaj muroj de dividoj, kiujn lingvaj diferencoj povus enkonduki en komunumon. Li tiel akiris la konvinkon, ke nur la ebleco de rekta komunikado povas alporti pacon inter homoj kaj ke necesas disvolvi universalan lingvon sufiĉe kompletan, neŭtralan kaj alireblan por la ordinara civitano. Esperanto, li diris, konas neniun fortan aŭ malfortan, privilegian aŭ malsuperan nacion. La revo de universala lingvo tiel aperas kiel esprimo de idealo, povi konstati, per la uzo de komuna lingvo, ke malaperas malakordo inter la homoj.

Jam la hipotezo pri artefarita lingvo estis levita en la 17-a jarcento de Descartes kaj precipe de Leibnitz, kiu, per la admiro, kiun li havis por *Ars Magna* de Raymond Lulle, rekonsideris projekton rilatan origine al la ideo de la filozofia alfabeto kiel ĝi disvolviĝis en la Oriento. La pasio, per kiu eminenta logikisto Louis Couturat defendis Esperanton, atestas, krome, la intereson vekitan de ĉi tiu demando inter filozofoj kaj kleruloj.

Tamen se la serĉado de universala lingvo konkretiĝis en la logika lingvo per kiu la nunaj sciencaj disciplinoj estas esprimitaj, Esperanto siavice prenas sian fonton empirie, en la ekzistantaj lingvoj kaj precipe en la latinaj kaj ĝermanaj lingvoj, kiujn cetere ĝi ne pretendas anstataŭi.

Ĝi aspiras fariĝi helpa lingvo, kiu aldonante al la naciaj lingvoj, kie estas esprimitaj la pensoj kaj la apartaj valoroj de ĉiu popolo, donus al la homaro la eblecon havi mezan uzeblon almenaŭ por tuta regiono. Sciencistoj, kiuj ne ĉesis kuraĝigi, per sia subteno aŭ sia partopreno, la disvolviĝon kaj plivastigon de Esperanto, ne ĉesas emfazi la helpan karakteron de ĉi tiu rimedo de komunikado. Al ĉi tiu alianco de logiko, modesteco kaj fervoro, Esperanto devas esti, inter la multaj internaciaj lingvoprojektoj, tiu, kiu certigis la plej daŭran historian sperton, kiu cetere ne estas ĝia plej malgrava merito.

Tamen la grava lingva problemo estas nur unu aspekto de komunikado. Jen kial Unesko entreprenis longdaŭran agon, kiu per ellasado de la koncepto de komunikado celas transformi ĝian praktikon por realigi la rajton al ĉiuj komuniki.

En sia dekoka sesio en 1974, la Ĝenerala Konferenco de Unesko petis min studi, konsulte kun la Membro-Ŝtatoj kaj profesiaj organizoj, la koncepton de rajto al komunikado.

En momento en kiu la fundamenta graveco de komunikado en demokratia socio fariĝas pli kaj pli asertema kaj kiam konsiderinda progreso en scienco kaj teknologio malfermas grandegajn eblojn al la homaro, la serĉado de nova ordo en la mondo ja koncernas

komunikadon en ekonomia, socia, kaj kultura sferoj. Ni nun komencas rekoni la valoron de kultura pluralismo kaj la gravecon por la tutmonda komunumo konservi la kulturan integrecon de ĉiu popolo.

La aserto de kultura identeco, bazita sur la rekono de la specifeco de ĉiu kulturo kaj la egaleco en digno de ĉiuj kulturoj, ne malhelpas fruktodonajn rilatojn. Male, per kontaktoj kaj interŝanĝoj, la diversaj kulturoj riĉigas sin reciproke. Efektive, kiel povus esti tiel, se la eblo de komunikado ne estus ofertita al ĉiuj, al individuoj kaj al nacioj.

Ĉi tio montras la gravecon doni plenan efikon al la rajto al informoj proklamita en artikolo 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĉar ne nur temas pri garantio al la popoloj de la eblo aliri kaj partopreni la rimedojn por komuniki; same gravas certigi plenan reciprokecon de informfluo en la sama nacio aŭ komunumo same kiel inter ĉiuj regionoj de la mondo. Komunikado estas duflanka procezo, kiu enhavas eblon informi kaj informiĝi.

Por garantii kaj la liberecon kaj la ekvilibron de la fluo de informoj, estas necese, ke la diversaj partneroj, laŭvice dissendantoj kaj ricevantoj, havu la rimedojn por permesi veran dialogon.

La nuna diferenco en la posedo kaj uzado de la komunikiloj tial konsistigas "tutmondan defion", kiu ne povus lasi Uneskon indiferenta. Efektive, ĝia Konstitucio devigas ĝin "antaŭenigi konon kaj reciprokan komprenon de nacioj helpe de amaskomunikiloj kaj tiucele rekomendi tiajn internaciajn interkonsentojn, kiujn ĝi opinias utilaj por faciligi la liberan movadon de ideoj vorte kaj imagbilde."

Unesko tiel intervenis plurfoje por adopti serion de internaciaj normoj. Ĝi helpas siajn membrolandojn, kiuj deziras disvolvi nacian komunikadan politikon. Unesko tamen ne havas kaj ne povas havi deciditan politikon de komunikado, kiu estus necesa nacinivele por ĝiaj Membro-Ŝtatoj. Ili elektas la vojon, kiu ŝajnas esti plej konforma al iliaj propraj aspiroj. Tio kion Unesko povas fari por helpi ilin tion atingi

estas stimuli interkonsiliĝon, kuraĝigi la interŝanĝon de spertoj kaj spuri kun ili la vojojn, kiuj fortigas internacian kunlaboron.

Unu el la gravaj mejloŝtonoj en ĉi tiu agado de vera proksimigo inter popoloj estas organizado de regionaj konferencoj pri komunika politiko. En San José de Kostariko, kie organiziĝis la unua el tiuj konferencoj, kiuj kunvenigis reprezentantojn de latinamerikaj kaj karibaj landoj, okazinta en julio 1976, la "rajto komuniki" estis en la kerno de la debatoj. Tiel riĉenhavaj kaj kompleksaj debatoj kiel eblas, ĉar temis pri relative lastatempa koncepto, kiu esprimas la novajn dimensiojn, kiujn la evoluo de teknikoj kaj tiu de ideoj donis al la koncepto de rajto je informo proklamita de la Deklaracio de la homaj rajtoj de 1948. La partoprenantoj unuanime adoptis la "Deklaron de Sankta Jozefo", kiu emfazas precipe ke: "Homoj rajtas havi aliron al ĉiuj kulturaj posedaĵoj kaj partopreni per senpaga kaj demokratia maniero en la diversaj manifestiĝoj de la menso".

Fakte, la plena ekzercado de la rajto al komunikado, se ĝi garantias aliron kaj partoprenon de la popoloj en komunikado, ankaŭ devas ebligi disvolvi sociecon de la homo, kuraĝigi kritikan pensadon kaj ĉefe stimuli individuan kaj kolektivian kreivon, kiu estas unu el la kondiĉoj de disvolviĝo.

En 1975 Unesko faris internacian enketon pri la rajto komuniki kun siaj Membro-Ŝtatoj. Tre riĉaj per sia diverseco, la respondoj montris grandan konverĝon de ideoj. Ĝenerale oni rekonis la respondecon kaj devojn de la amaskomunikiloj rilate al la socio, same kiel la gravecon de aliro al informoj kaj efika ekzercado de la rajto informi kaj informiĝi. Oni ankaŭ emfazis, ke oni devas konservi la integrecon de kulturoj sed sen ŝovinismo kaj ke nepre ĉiu ajn lando konigu siajn vidpunktojn kaj estu aŭdata internacie.

Necesas diri, ke la problemoj levitaj estas tute ne simplaj. Jen kial Unesko celas samtempe pli bone difini la signifon kaj la implicojn de la rajto al komunikado, kiel ĝin perceptas malsamaj kulturoj kaj

socioekonomiaj sistemoj, kaj ĉefe antaŭenigi larĝan debaton, kun studoj pri ĉiuj problemoj, kiujn ĝi levas.

Historia alproksimiĝo kaj kultura aliro, ekzameno de teknologiaj implico, filozofiaj, juraj kaj politikaj aspektoj, efiko al socio, nuna stato de informfluo kaj formulado de politiko de komunikado, ĉi tiuj ŝajnas esti kelkaj el la esencaj demandoj. Gravas profundigi por pli bona kompreno de la problemoj de rajto al komunikado.

Tiucele kaj en la kadro de sia longtempa esplora programo, Unesko deziras kunlabori proksime kun ĉiuj siaj Membro-Ŝtatoj, naciaj, profesiaj kaj akademaj institucioj, kaj neregistaraj organizaĵoj, por kuraĝigi ĉie studadon kaj diskutadon.

Multaj esploroj estas inkluzivitaj en ĝia programo. Ili rilatas al:

- studo de la rolo kaj procezoj de komunikado en la socio kaj la internacia fluo de informoj;
- eksperimentaj agadoj rilate al disvolviĝo de komunumaj amaskomunikiloj, plibonigante aliron al amaskomunikilaj kanaloj kaj materialoj;
- serĉado de mezuriloj por garantii homajn rajtojn;
- promocio de senpaga kaj ekvilibra fluo de informoj, politikoj, infrastrukturoj kaj trejnado en la kampo de komunikado;
- studo de la perspektivoj por komunikado inter nacioj kaj la limoj kiuj pezas sur ili, konsiderante precipe la uzon de novaj teknologioj kiel persatelita dissendo.

Unesko do trovas sin engaĝita, per la volo de la komunumo de siaj membroŝtatoj, en interkonsiliĝo, kiu radikas al unu el la grandaj problemoj de la nuntempa mondo: preter informo, ĝi celas permesi al homoj komuniki. Ĉar ni povas esti "informitaj" sen nepre "komuniki" kaj iuj esploristoj eĉ argumentas, ke en la okazo de industriigitaj landoj ĝenerale ju pli "ni konsumas" informojn, des malpli ni vere komunikas kaj des pli multe ni bezonas komuniki.

Je la fino de la ekzameno, kiun ĝi entreprenas pri ĉiuj problemoj de komunikado en la moderna mondo, Unesko esperas vidi interkonsenton atingitan pri tio, kio devas esti la celo kaj la kialo de komunikado en la mondo kaj laŭ la metodoj, per kiuj la internacia komunumo povis pligrandigi sian agadon por igi la komunikadon privilegiita rimedo de progreso por popoloj kaj kompreno inter nacioj.

Sinjorinoj,
Sinjoroj Delegitoj,

La celo, kiun via Kongreso proponas per ekzameno de la rajto komuniki, de la malhelpo al aplikado de ĉi tiu rajto, precipe la lingvaj baroj, estas do ĉe la fundo de la nuna problemaro de la mondo.

Ĉar se la obstakloj al la universala cirkulado de pensoj kaj ideoj ĉiam ekzistis, komunikado inter popoloj de diversaj lingvoj kaj kulturoj ĉiam aperis kiel idealo eminente atinginda.

Hodiaŭ ĝi elstaras kiel neceso en mondo, kie la interdependeco de ĉiuj homoj daŭre pligraviĝas. La aserto de libereco de penso kaj esprimo estas certe fundamenta, sed necesas ankaŭ krei la kondiĉojn, kiuj ebligas ĝin kaj ĉi tion, sen ia ajn diskriminacio.

Sinjorinoj,
Sinjoroj,

Ĉiuj lingvoj estas egalaj laŭ digno kaj kiel instrumentoj de komunikado, eĉ se ekzistas diferencoj koncerne la amplekson de ilia disvastigado. Se neniu el ili estas tutmonda laŭ naturo, ĉiu reprezentas laŭ sia maniero sperton, atingon, unikan stadion de homa progreso. Tiel, en tempo, kiam ekzistas tiom da teknikaj ebloj por establi aŭ amplifi dialogon inter homoj, ili devas scivoli pri la baroj, kiujn konsistigas lingvaj diferencoj, kaj ankaŭ pri la rimedoj por superi ilin.

En 1974, Unesko-studo malkaŝis la ekstreman malriĉecon de esplorado pri interkultura komunikado kaj ankaŭ la obstaklojn, kiuj malhelpas la

disvolviĝon de ĉi tiu komunikado: kulturaj diferencoj, psikologiaj blokadoj malhelpantaj komprenon, foreston de komuna lingvo, ktp. Dum la pasintaj jaroj intensiĝis la debato pri interkultura komunikado, kiam pligrandiĝis la ebleco de rekta disvastigo trans landlimoj. La kerno de la debato estas la konscio, ke komunikado estas potenco. Iuj eĉ argumentas, ke ĝi estas "la potenco". Regi naciajn inform sistemon povas fakte permesi al certaj interesoj influi la decidprocezon de la socio, aŭ eĉ agi surbaze de la kulturaj kaj politikaj valoroj, kiuj cementas ĝin. Ĉi tio denove substrekas la gravecon de la temo, kiun vi celas debati.

Ĉu vi permesos al mi konkludi per ideo, kiun mi menciis ĉe la lasta Ĝenerala Konferenco de Unesko pasintan novembron en Nairobi? Temas pri la graveco, ke en la perspektivo de transformo de rilatoj inter nacioj, informo rezultigu ekvilibrantan bilancon pri la vidpunktoj de ĉiuj partneroj.

La demando pri informado nun kuŝas en la tagordo. Verŝajne ĝi restos tie dum la venontaj jaroj, ĉar ĝi estas proksime ligita al ĉi tiu rajto al komunikado, kiu, plene efektivigita kadre de kunlaboro sur egaleca bazo inter nacioj, nepre bezonas agnoskon de la rajto al kultura diferenco.

Sinjoro Prezidanto,
Sinjorinoj, Sinjoroj,

Mi estas konvinkita, ke same tiu respekto de kulturaj diferencoj kiel ankaŭ ĉi tiu deziro al internacia proksimigo inspiras vin. Jen kial mi esprimas miajn sincerajn esperojn, ke la laboroj de via Kongreso estos same fruktodonaj kiel pozitivaj.

**Parolado de s-ro Amadou-Mahtar M'Bow,
Ĝenerala Direktoro de Unesko,
okaze de la festo de la centjariĝo de la kreado de Esperanto
(Unesko-Sidejo, 16 decembro 1986, Parizo).**

Sinjoro prezidanto,
Karaj Profesoro,
Sinjorinoj kaj Sinjoroj,

Antaŭ nelonge mi legis, historian verkon pri la 19a jarcento.

Kaj fakto impresis min frapis tiam, fakto evidenta tiutempe, sed kiu hodiaŭ ŝajnas apenaŭ kredebla: letero sendita de Londono al Delhio povus vojaĝi ses monatojn por atingi sian adresaton kaj ĝia sendanto devis atendi jaron por ricevi eblan respondon. Nuntempe, ĉi tiu letero kovrus la saman vojon en du aŭ tri tagoj, telegramo en unu aŭ du horoj, telekso tujtuje.

La tuta mondo nun estas ĉirkaŭata de ĉiam pli densa reto de kontaktoj kaj interŝanĝoj de informoj, per kiuj kreskanta nombro da homoj trovas sin konektitaj al la tuta mondo kaj ĉiutage lernas sian senfinan diversecon. Sendube la intuo de tia evoluo igis D-ron Zamenhof antaŭ cent jaroj imagi unikan rimedon por komuniki, neŭtrala lingvo ne apartenanta al iu ajn nacio kaj kiu tial povas servi kiel kodo komuna al ĉiuj.

La historia kaj kultura kunteksto, en kiu doktoro Zamenhof vivis, ne estas fremda al la decido, kiun li faris por realigi sian projekton, kiel ĵus pruvis profesoro Perron. Pola kuracisto, li komence ne havis apartan kompetenton pri lingvaj aferoj, sed li evoluis en medio, kie plej diversaj kutimoj kaj lingvoj senĉese interfrotiĝis (poloj, litovoj, rusoj, jididoj).

Atestanto de senĉesaj kvereloj estiĝantaj pro nekompreno, kiu regis inter ĉi tiuj diversaj religiaj kaj lingvaj komunumoj, d-ro Zamenhof konceptis Esperanton kiel rimedon por malfermiĝi kaj reciproke interkompreniĝi, kiel ilon por proksimigi popolojn kaj, finfine, kiel ilon por esperi, fidi mondon de universala frateco.

Pluraj provoj estis jam faritaj por krei artefaritajn lingvojn, sed malsukcesaj provoj. Esperanto, male, atingis sukceson; iom post iom la historio juste taksis tiun de D-ro Zamenhof. Sen ia dubo la unua kialo de ĉi tiu sukceso estas la kvalitoj ekvilibro, konstanteco kaj klareco de Esperanto. Ĝia gramatika sistemo estas logika; la kreado de novaj vortoj el ekzistantaj radikoj estas regata de simplaj reguloj; la ortografio akordas kun la fonetiko.

La tutmonda disvolviĝo de Esperanto tamen certe ŝuldiĝas al la konstanta pligrandiĝo de la bezonoj por komunikado kaj reciproka kompreno en la internacia komunumo. Ĝia uzado trapasas novan sojlon post la dua mondmilito pro la rapida disvastigo de internaciaj rilatoj kaj ĉiaj kontaktoj, disvastigo kaŭzita de progreso de modernaj konektoj.

Hodiaŭ Universala Esperanto-Asocio povas fieri pri la rezultoj akiritaj kaj pravas, ke ĝi starigis al si la celon antaŭenigi la enkondukon de Esperanto kiel dua aŭ tria lingvo en lernejoj kaj videble uzata por tradukado de sciencaj verkoj.

Kiel substrekite de la lasta Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Pekino ĉi-jare, Esperanto nun aperas konkrete kiel unu el la plej efikaj instrumentoj de internacia kompreno, antaŭenigante multflankajn interŝanĝojn en ĉiuj kampoj de kulturo kaj scienco.

Fine la viveco de Esperanto manifestiĝas ankaŭ en tio, ke la Esperantomovado estas movado de profunde humanisma inspiro.

Ĝi krome estas movado pritraktanta ĉiam pli vastajn demandojn, kiuj iras preter la sola zorgado disvastigi ĉi tiun lingvon. Tiel, kunveno de spertuloj organizita pasintjare ĉe Unesko-Ĉefsidejo de Universala

Esperanto-Asocio traktis temojn kiel "Ĉu la modelo 'en unu lando, unu nacio, unu lingvo' estas akceptebla?", "Kiun estontecon havos minoritataj lingvoj?", "Kion fari koncerne la lingvojn hereditajn de la kolonia sistemo?".

Esperanto situas do kerne de unu el la plej debatataj kaj aktualaj demandoj, tiu pri la manieroj kaj rimedoj por proksimigi popolojn kaj kulturojn de la mondo per helplingvo universaleca, kiu senminace kunvivu kun ĉiuj naciaj kaj lokaj lingvoj. Sed mi aldonus ankaŭ, ke ĉi tiu lingva aspekto estas parto de multe pli vasta humanisma aspiro kaj tio igas la Esperanto-movadon tiel originala.

Tial, sinjoro prezidanto, mi esperas, ke Esperanto, kiu jam estas adoptita de centmiloj da homoj tra la mondo kaj instruita en multaj universitatoj, estos uzata eĉ pli vaste en la estonteco kaj ke la Esperanto-komunumo, kun ĉiuj esperoj, kiujn ĝi portas en ĝi, daŭre plivastiĝos en ĉiuj landoj. Universala Esperanto-Asocio ludas ĉefan rolon tiurilate, kaj mi varme gratulas ĝin.

Mi ankaŭ ŝatus, sinjoro prezidanto, danki ĝin plej varme pro la honoro, kiun ĝi hodiaŭ faris al mi, donante al mi la Premion Zamenhof.

Mi estas aparte sentema al ĉi tiu Premio. Kiam mi unuafoje ĉeestis la Kongreson de via Asocio en Rejkjaviko, mi estis profunde emociita de la sentemo de la membroj en la movado al la plej gravaj problemoj de nia epoko, per ilia volo kontribui pli grandskale ol sukcesis D-ro Zamenhof al kunvenigo de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj de la mondo.

Sinjoro prezidanto, ne aŭskultu tiujn, por kiuj iu humanisma projekto fariĝas utopia projekto. Vi ja diris, ke la utopio, kiu vigligis D-ron Zamenhof efektiviĝis. Tial trans ŝtormoj kaj miskomprenoj, kiam oni ja fidis ion, oni ĉiam devas daŭrigi, senĉese kaj senhezite daŭrigi. Eble tio ĉi honorigas homon laŭ la plej forta senco de la esprimo.

Ĉi tiun fidon, mi trovas profunde enradikigita en vi, en ĉiuj partoprenantoj en via movado. Tial mi havas la plej grandan respekton

al ĉiuj, kiuj partoprenas ĝin. La okazo estas donita al mi, en ĉiu el miaj vojaĝoj, renkonti ilin en la landoj, kiujn mi vizitas, en la urboj, kie la devoj de mia funkcio igas min resti pli-malpli longajn periodojn. Mi ĉiam antaŭĝojas paroli kun ili, ĉar mi scias, ke ni havas ion profunde komunan: nian kredon je homo, kia ajn estas la koloro de lia haŭto, kia ajn lia religio, kio ajn estas la filozofio, kiun tiu homo adoptis.

Jen kial, sinjoro prezidanto, en mia persona nomo kiel en la nomo de Unesko, kiun ĉi tiu honoro atingas tra mia persono, mi petas vin kredi, ke en ĉi tiu jaro de la centjariĝo de la kreado de Esperanto, mi plene konscias pri la prezo de la rekompenco, kiun vi ĵus donis al mi, kaj mi dankas vin tre profunde.

Dankon al ĉiuj.

**Mesaĝo de Audrey Azoulay,
Ĝenerala direktoro de Unesko,
okaze de la Universala Kongreso en Lisbono, 29 julio 2018.**

Feliĉigas min povi adresi ĉi tiun subtenan mesaĝon al la partoprenantoj en la 103-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. Vi havas la eblecon renkontiĝi en ĉi tiu grandioza urbo Lisbono, urbo plenigita de la historio, kiu estis konstruita ĉe la vojkruciĝo de diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, ĉe la pinto de la iberia duoninsulo. Mi havas nenian dubon, ke ĉi tiu escepta aranĝo inspiras vin por fruktodonaj diskutoj. Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto jam de multaj jaroj. Nia Organizo ja dividas kun la Esperanto-movado komunajn valorojn: la aspiro konstrui mondon de paco, interkompreniĝo inter popoloj, respekto al kultura diverseco, solidareco trans landlimoj. La gluo de ĉiuj ĉi valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, dividi. Lingvoj, kiuj estas la vektoro de ĉi tiu dialogo, konsistigas, por la komiso, kiun ni devas plenumi, kaj por la defendo de niaj valoroj, esencan elementon.

Ni devas defendi lingvojn, precipe maloftajn lingvojn, indiĝenajn lingvojn, kiujn ni scias hodiaŭ, kiuj malaperas ĉiun duan semajnon - neriparebla perdo por la heredaĵo de la homaro. Ni ankaŭ devas defendi multlingvismon, en edukado, per publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de interreto, por vivigi la lingvan kaj kulturan diversecon de ĉiuj komunumoj; ĉiu virino kaj ĉiu viro povu alpreni sian historion, sian identecon, el la simbolaj rimedoj de sia devenlanda komunumo.

Ĉi tiu devontigo estas ankaŭ via. Ĉar Esperanto ne celas forviŝi la amason da lingvoj parolataj en la mondo; male, ĝi montriĝas komunika rimedo respektema al ĉiuj lingvoj, parolataj ĉu de plimulto ĉu de malplimulto, kaj starigas komunumon de parolantoj ne influataj de iu ajn ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio. Paroli Esperanton signifas altiĝi ĝis la nivelo de tutmonda konscio, esti mondĉivitano – sen rezigni pri siaj propraj ligoj.

La temo elektita por via kongreso ĉi-jare estas: "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien ni volas iri?" La direkto sekvinda certe estas tiu, kiun indikis via movado kaj nia Organizo dum multaj jaroj: devontigi sin denove kaj denove konservi kaj vivteni ĉi tiun esencan elementon de la nemateria heredaĵo de la homaro, kiu estas lingvoj; defendi lingvan diversecon kaj antaŭenigi multlingvan edukadon. Do ni povas konstrui pli malferman, pli inkluzivan kaj pacan mondon.

"Pluraj voĉoj, unu mondo": jen la slogano de nia emblema eldono, la Kuriero de Unesko. "Multaj voĉoj, unu mondo", jen kiel Esperanto tradukas ĉi tiun idealon, kiun ni dividas – kaj kiu estas surskribita en la versio de nia revuo, kiu nun aperas en Esperanto – *UNESKO-KURIERO*. Mi ankoraŭ bondeziru, nome de Unesko, plenan sukceson al via Kongreso.

Audrey Azoulay

**Interveno en plena kunsido de Rakoen Maertens
nome de Universala Esperanto-Asocio),
Parizo, 6 novembro 2017**

Honora Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco,
Honora Ĝenerala Direktoro,
Via Ekscelenco,
Distingitaj Delegitoj,
Gesinjoroj,

Komunikado. Tial ni ĉiuj estas ĉi tie. Ni estas ĉi tie, por trovi komunan terenon. Ni estas ĉi tie, por pliigi la komprenon unu de la alia. Ni ĉiuj volas konstrui partnerecojn ĉirkaŭ niaj valoroj, niaj kredoj kaj nia komuna vidado. Tamen, komunikado ne ĉiam estas tio, kio ĝi ŝajnas esti. Ekzistas baroj. Unu el tiuj baroj povas esti lingvo. Diferencoj en lingva nivelo kaj lingva fono, depende de kie ni naskiĝas. La interpreto de simboloj kaj gestoj, ligitaj al kulturo. Malegaleco en mem-esprimo, ĉar iun lingvon oni ne povas rekoni, dum aliajn oni povas. Uzi specifan lingvon, ligitan al difinita kulturo, kreas komunikan malprosperon.

Universala Esperanto-Asocio, provas trakti ĉi tiujn problemojn. Kune kun pli ol 100 naciaj Esperanto-asocioj kaj pli ol 60 specialaj Esperanto-agentoj, nia asocio pledas por profundigo de komunikado, egaleco de lingvo kaj kulturo, lingva diverseco kaj interkultura interŝanĝo. Fondita en 1908, nia Asocio havas longan historion pri pledado por ĉi tiuj valoroj. Dum pli ol sesdek jaroj nia Asocio havas konsultajn rilatojn kun UN kaj Unesko. Dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954 kaj Sofio en 1985, niaj laboroj kaj atingoj estis oficiale agnoskitaj kiel progresigantaj reciprokan komprenon inter la popoloj de la mondo. La deirpunkto de la internacia lingvo Esperanto estas la bezono de pli bona komunikado, kaj ĉi tio per dividita – egalrajta lingvo. Lingvo facile lernebla kaj ligita al neniu specifa politika potenco. Ĉi-jare ni kune kun Unesko memorigas la humaniston, kiu

kreis Esperanton, Ludwik Zamenhof, pro la 100-jara datreveno de lia forpaso. Ni sincere dankas Uneskon kaj la polan delegacion pro la helpo en realigo de ĉi tiu festo, kaj bonkore invitas vin ĉiujn kunveni kun ni la 11-an de decembro en ĉi tiu konstruaĵo. Ni ankaŭ feliĉas anonci, ke de la nuna jaro la revivigita *Unesko-Kuriero* havas esperantan eldonon.

Komunikado. Mi komencis ĉi tiujn komentojn emfazante la gravecon de kvalita komunikado. Permesu al mi fini dezirante al vi profundan, signifan kaj produktan dialogon kun spirito de malfermo kaj kompreno.

Dankon.

**Interveno en plena kunsido de François Lo Jacomo,
nome de Universala Esperanto-Asocio,
Parizo, 16 novembro 2019**

Sinjoro prezidanto de la Ĝenerala Konferenco,
Sinjorino ĝenerala direktoro,
Ekscelencoj,
Sinjorinoj kaj Sinjoroj,

Dankon al sinjorino Azoulay pro la aserto, en 2018, ke Unesko "dividas kun la Esperanto-movado komunajn valorojn: la aspiro konstrui mondon de paco, interkompreniĝo inter popoloj, respekto al kultura diverseco, solidareco trans landlimoj". Dankon al Unesko pro ĝia asociiĝo, en 2017, kun la centjariĝo de la morto de Ludwik Zamenhof, konstruinto de Esperanto. Partnero de Unesko ekde 1954, elektita en marto 2018 estrarano de la Konferenco de NROj en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, Universala Esperanto-Asocio, kun Esperanto-instruistoj kaj Esperanto-junularo, diligentas al antaŭenigo de la idealoj kaj valoroj de Unesko. Afriko, prioritato de Unesko, gastigos la 7an Afrikan Kongreson de Esperanto en Burundo post unu monato, kun

jam 150 aliĝintoj. La asocio "Scio sen bariloj" ĵus organizis en Benino trejnajn seminarion pri laborserĉado por afrikaj virinoj, instruante al ili samtempe skribi en sia lingvo, Fon, kaj paroli Esperanton. En ĉi tiu Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, ILEI ofertas al Unesko kolekti, traduki kaj publikigi ĉefverkojn de indiĝenaj popoloj, kiuj estas minacataj aŭ persekutataj. En 2018, Unesko donis sian patronecon al la 70-jariĝo de Mondcivitanoj de la Mondo, kaj nia organizo aktive kunlaboras en la forumo 2020 pri mondcivitaneco, pruvante "ke la bezono de komuna lingvo povas esti akordigebla kun la bezono konservi lingvan diversecon".

En ĉi tiu lukto kontraŭ lingva diskriminacio, ĉe la konferenco de UN pri civila socio fine de aŭgusto 2019 en Sallagurbo (Salt Lake City), UEA gvidis laborgrupon pri la temo: "Ĉu sufiĉas la angla lingvo? Ni aŭskultu la multajn voĉojn de la mondo".

"Multaj voĉoj, unu mondo", "pluraj voĉoj, unu mondo": tio estas la slogano de Unesko-Kuriero, kiu estas eldonita en dek lingvoj, inkluzive Esperanton. Kaj pro la kontribuo, kiun Esperanto alportas al la kultura diverseco, ni deziras, ke ĝi rapide estu enskribita en la reprezenta listo de la nemateria kultura heredaĵo de la homaro, ĉar ĝi jam aperas sur ties naciaj listoj de Pollando kaj Kroatio.

En ĉi tiu mondo, kie ĉio iras tre rapide kaj kie la interŝanĝoj multiĝas inter landoj de la mondo, ni elektu instrui la lingvon, kiu estos lernita en rekorda tempo kaj kun facileco, danke al sia logiko kaj sia efikeco, ĉar ĝi estas fonema; kaj kun entuziasmo ĉar ĝi estas justa.

Dankon.

**Interveno en plena kunsido de François Lo Jacomo,
nome de Universala Esperanto-Asocio,
Parizo, 13 novembro 2021.**

Ambasadoraj moŝtoj,

UEA, Universala Esperanto-Asocio, fondita en 1908, kunlaboranta kun Unesko de post 1954, kaj estrarano de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Statuso kun UN, ĉeestas en pli ol cent landoj. En Brazilo, Sinjoro Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco, ni organizis nian Universalan Kongreson en 1981 kaj 2002, kaj nia nuna vicprezidanto estas brazilano. En Afriko, apud la svahila lingvo, Esperanto pli kaj pli rolas kiel interafrika lingvo: en Tanzanio, kie ĝi estas instruata en lernejoj, en Demokratia Respubliko Kongo, kie filmoj estas produktataj en tiu ĉi lingvo, en Senegalio kie okazos la venonta afrika kongreso de Esperanto, en Burundo, kie ĵus aperis Esperanto-lernolibro en la svahila...

En Ĉinio: post ekesperantigo de Unesko-Kuriero, nia Organizo kuneldonis kun Unesko esperantan kaj ĉinan tradukojn de la verko: De ideoj al agoj, 70 jaroj de Unesko. Kunlabore kun Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kaj kun Unesko, ni klopodas konstrui novan Mondcivitanecon kaj ni aktive partoprenas la Festivalon por la Paco, kiun grupo de NROj organizos venontjare, kun Esperanto kiel unu el ĝiaj laborlingvoj.

Por kontribui al la diskonigo de tutmonda kultura heredaĵo, UEA publikigas libro-serion, *Oriento-okcidento*, kun jam 59 tradukoj de famaj verkoj el diversaj kulturoj. Ĉu Esperanto ne estas mem elemento de la nemateria kultura heredaĵo de la homaro?

La 26a de julio estas grava tago por la esperantistoj, tago en kiu, en 1887, la revo de juna judo el Białystok iĝis realaĵo... kaj ni deziras partoprenigi en tiu festo ĉiujn, kiuj kunhavas niajn komunajn valorojn: dezirego konstrui pacan mondon, interkonsento de la popoloj, respekto de la kultura diverseco, solidareco trans la landlimoj.

Por ke niaj diferencoj ne plu estu sentataj kiel handikapo, sed kiel riĉeco, kiel pluraj kompletigaj vidoj al la realaĵo, necesas evoluigi novan specon de aŭskultado de la aliaj, kiel ebligas Esperanto pro sia lern-koncizeco kaj ĝia neŭtraleco.